Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Majo-Junio 2022 | n-ro 05-06 (1403-1404)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# PERANTOJ

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE50 7506 3730 5118, BIC: AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl. 03 Ap. 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete: magisterpita@gmail.com
tel: +55 21 98863-3854
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT Sennacieca Asocio Tutmonda"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉinio** – Bruno Guy Claude Henry
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
Bank of China - Hunan Branch n-ro 593 1, Duan Furong Road (M) Changsha - Hunan - Ĉinio
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de
**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Nicola Ruggiero
Via Francesco Petrarca, 9
IT-10126 Torino (TO)
rete: nicolaruggiero1986@gmail.com
IBAN: IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC: INGBITD1
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
Joaquim Antonio de Aguiar 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.:+351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL
**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Dieter Rooke,
Interlakenstr. 122A, CH-3705 Faulensee.
rete: dieter.rooke@vtxmail.ch
tel:+41 62 396 01 86
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

## KOTIZOJ 2022

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |
| Kostariko | 12 € | | |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.
> **Nura abono al *Sennaciulo*: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.
> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org
**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Brandon Sowers
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto:* Alexandra Paz
*Ceteraj membroj:* Saioa Escobar, Paz (Jung Hyunsoo), Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Saioa Escobar, Paz
**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* José Antonio del Barrio, Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al:*
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Ĉi-tiu tria numero de la jarkolekto 2022 atingos vin rete komence de 2023. Ĝi enhavas interalie diversajn raportojn pri la 95a SAT-kongreso, kaj pliajn artikolojn pri unu el la temoj vaste debatitaj tiam, nome pri la milito en Ukrainio. Ankaŭ aliaj artikoloj ĉi-numeraj estas reagoj al pli frue aperintaj kontribuoj, do malgraŭ la malfruo, Sennaciulo plu rolas kiel interŝanĝejo por malsamopiniantoj.

Kun tiu ĉi numero ankaŭ estas ekspedita aliĝilo por la 96a SAT-kongreso okazonta en Greziljono inter la 18a kaj 25a de julio 2023. Ne mistrafu tiun eblecon denove havi senperajn rektajn kontaktojn kun aliaj kamaradoj aŭ amikoj de SAT.

Pri la malfruo en la aperritmo kaj la perspektivoj por reveni al normaleco, vi ricevis ampleksan klarigon aldone al la ĵus antaŭa numero (3-4). Ni ree aldonas ĝin informcele al reta dissendo de tiu ĉi numero 5-6 por informi tiujn, kiuj abonas nur la retan version. Aldona temporaba problemo, kiu trafas kelkajn dekojn da membroj, estas nealveno de Sennaciulo malgraŭ sendo al ĝusta adreso. Pri tiuj problemoj, kies kaŭzoj ne ĉiam estas klare kompreneblaj, ni klopodas reklamacii ĉe la franca poŝto kaj organizi resendon de la nealvenintaj ekzempleroj.

Agrablan legadon kaj feliĉan novjaron deziras al vi

La redaktoskipo




# Enhavo
Enhavo

**95a SAT-Kongreso**

4 La SAT-kongreso de 2022 ombrita de la ukraina milito

6 Deklaracio

7 Gvidrezolucio

8 Agadraporto de la PK

10 Bilanco 2021

12 Spezokontoj 2021

13 Raportoj de kaskontrolintoj 2021

**Tra la mondo : Ukrainio**

14 Pri la milito en Ukrainio

15 Ukrainio kaj misinformado

16 Tendarismo

**Tra la mondo : Eŭropo**

18 La portugala demokratio estas multe pli inkludema kaj partopreniga ol la hispana demokratio

22 Redukto de laborhoroj : socia neceso

24 Giuseppe Belvedere

**Beletro**

28 Verdaj bomboj kontraŭ grizaj katakomboj

30 Hispana somero

**Humuro**

32 Baptonomoj

**Opinioj - Reagoj**

33 Gelaboristoj de ĉiuj landoj, unuiĝu

34 Nova provo por nigrigi socialismon

35 Plu pri la kanzono "Li liberas Maks" de H Christiani

**Liberpensula Frakcio**

37 La Proleta Revolucio kaj Esperanto

38 Liberpensula Frakcio - 13 demandoj

**El la SAT-administrejo**

38 Novaj aliĝoj

**Tra Esperantio**

39 Asocio Nova Familio : prizorgas la infanajn georfojn en la urbo Goma

**Frontpaĝa bildo:**

Kongresanoj dum la fermo de la 95a SAT-Kongreso. Kunmetaĵo el pluraj ekrankopioj.

# La SAT-kongreso de 2022 ombrita de la ukraina milito

[Teksto: G. Mickle]

## Nuliĝis la planita ĉeesta kongreso en Moskvo

Kompare kun la katastrofeco de la nuna milito por homoj en Ukrainio, ankaŭ por homoj en Rusio kaj homoj en landoj trafitaj de grenmanko kaj aliaj ekonomiaj sekvoj, la problemo frontita de SAT malpezas. SAT devis fine de februaro subite iel elturniĝi, kiam ĝia por Moskvo planita ĉiujara kongreso en la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj ne povis okazi laŭplane. Bedaŭrinde, ĉar ne ĉiu SAT-kongreso okazas en historioriĉa metropolo. Elturniĝi SAT fine povis, okazigante la trian fojon en sinsekvo virtualan (per-interretan) kongreson. Ĝi titoliĝis: "Por paco per Esperanto".




## La PK kaj OKK klarigis

La Plenum-komitato (PK) kaj la Organiza Kongresa Komitato (OKK) jam tagojn post la komenco de la milito, la 3-an de marto, deklaris, "ke pro la morala kaj praktika maleblo okazigi kongreson de SAT en militanta lando, la kongreso ĉi-jare ne povos okazi ĉeeste", kaj pritaksis la karakteron de la milito per la vortoj: "Ni kondamnas la teruran agreson de la nuntempa registaro en Rusio kontraŭ la ukraina popolo. Ni subtenas la kontraŭmilitan movadon en Rusio, kaj esperantistojn, laboristojn, studentojn kaj popolojn en la mondo, kiuj helpas civilulojn en Ukrainio. Diplomatio tutmonde devas agadi por ĉesigi la militon kaj ne akceligi konfliktojn. Ne al milito. Jes al paco!". En la deklaro la PK kaj OKK anoncis la intencon aranĝi kongreson laŭ alternativa maniero.

Tiun ĉi deklaron aprobis multaj, sed ne ĉiuj. Kelkaj opiniis ĝin ne ekvilibra, atentigante pri la antaŭhistorio de la konflikto kaj la rolo de NATO en ĝi. Ne mirige, ĉar la opinioj de la esperantlingva publiko ĉie, ankaŭ en SAT, nur grade devias de la opinioj en la socioj, el kiuj la homoj devenas, kaj plejparte en tiuj socioj la opinioj pri la milito kontraŭdiras unu la alian kaj iĝis fontoj de notinda politika antagonismo.

Iom akraj retforumaj debatoj en SAT antaŭ la kongreso povis aŭguri alfrontiĝon de neakordigeblaj vidpunktoj dum la laborkunveno en la lasta tago de la kongreso, en kiu oni debatis pri la *Deklaracio*. La milito neeviteble iĝis la ĉefa temo en ĝi. Sed fine evidentiĝis relativa akordo de opinioj inter la kongresanoj en la kunveno. Konflikto ne okazis. La proponitaj punktoj por la rezolucio tamen emfazis malsamajn aspektojn kaj de la milita situacio kaj de la monda stato emananta el ĝi. Kelkaj el la tuŝitaj punktoj: kondamno de la rusia agresmilito kontraŭ Ukrainio, sed ankaŭ de aliaj militoj en la mondo, dissolvo de militaliancoj, anstataŭigendaj per novaj kolektivaj sekurec-sistemoj, malarmado, opozicio kontraŭ fortiĝo de militaj kaj ekonomiaj blokoj.

## Multa spaco donita al laborkunvenoj ...

En laborkunsidoj SAT praktikis tiun rektan demokration, kiu tradicie regas dumkongrese. Pacience la kongresanoj travadis agadraportojn, elektis funkciulojn. Kunvenis la LEA-Komitato – diskutanta denove la eventualan fondon de novaj LEA-oj en pliaj lingvoregionoj resp. landoj – kaj la Poresperanta Fako. Malagrable konstatitaj estis la perturboj rilate la aperadon de Sennaciulo, kiu nun aperas kun kelkmonata malfruiĝo, parte pro subite necesiĝinta ŝanĝo de la presejo. Pri rekapto de la aperritmo oni nun esperas.

Temigita en unu laborkunsido estis "Retejo kaj Sociaj Retoj de SAT". Pri uzeblaj kaj uzindaj retplatformoj (Discord, Telegram, Jitsi) la opinioj diversas. Oni interkonsentis (*Gvidrezolucio*) "starigi teknikan komisionon

por pritaksi la retejon de SAT kaj ĝiajn aliajn rimedojn de interreta komunikado, kaj pritaksi eblecojn por ilia plibonigo", ankaŭ "elprovi elektronikajn ilojn, interalie referendumojn, per kiuj eblas pli ofte dum la jaro interkontaktigi membrojn de SAT kaj ebligi interŝanĝojn de opinioj pri disputvekaj temoj". Kongresanoj ne tute samopiniis pri la utilo de retbazitaj referendumoj por ekzemple ellabori starpunkton de SAT ĉe subitaj mondgravaj eventoj kiel la nuna milito, aŭ simple por ekscii, ĉu ekzistas en SAT komuna opinio pri io, kaj kia.

Plia temo estis "Kiel organizi venontajn kongresojn kaj pli efikajn membrajn interrilatojn" – ĉe kiu retplatformoj denove fariĝis temo.

Frakciaj kunvenoj dum retbazita kongreso ne funkcias kiel internaj aranĝoj de la frakcioj, sed trudate de la cirkonstancoj ili iĝas komunaj eventoj sub la gvido de la frakcioj, partoprenataj de ĉiuj. Po unu horo por siaj kunvenoj, kelkakaze tre neformalaj, havis la Vegetara Sekcio, Sennaciista Frakcio, Komunista Frakcio, Liberecana Frakcio, Liberpensula Frakcio, Ekologiisma Frakcio. La Vegetara Sekcio konsideras la eblon okazigi denovan Renkontiĝon Veganan en Greziljono en 2023, post la sukcesa ReVe en 2018.

## ... sed ankaŭ al kulturaj kaj politik-temaj aranĝoj

Bonŝance, du kulture aktivaj loĝantoj de la origine vizitota kongreslando povis prezenti siajn kontribuojn tra Zoom, kune kun aliaj:

- Mikaelo Bronŝtejn pri sia historia romano *Mi stelojn jungis al revado*, kaj detale kaj enhavoriĉe pri ĝia historia fono, konenda por aprezi la verkon, la postrevolucia sovetia Esperanto-movado kaj ĝia tragika estingiĝo fine de la 1930-aj jaroj;
- Xana Paz prelegis pri "Kolonia/liberiga milito: Interkonsentoj (1974-1975) inter Portugalio, Angolo, Mozambiko kaj Gvineo-Bisao", t.e. pri tempo, en kiu revoluciaj ŝanĝoj alportis finon al longe daŭrintaj militoj;
- Mikaelo Povorin, kiu koncertis per animtrankviligaj kantoj, helpante paŭzi inter atentoŝtreĉaj laborkunvenoj;
- komuna diskuto pri la milito en Ukrainio ne povis elĉerpi la temon, preterfluge levante temojn kiel naciismo, tendarismo, rifuĝintoj, ver-enhavo (aŭ ties manko) en la cirkulantaj primilitaj informoj.

## La kongresa *Deklaracio* debatita

La debato kaj decidofarado pri la *Deklaracio* kaj la *Gvidrezolucio* antaŭeniris rimarkinde glate, se konsideri la malabundan tempon disponitan de la Proponkomisiono kaj la kongresanaro por prepari ĝin, kaj, krome, la abundon de punktoj traktendaj en tri horoj. El la 12 punktoj de la Deklaracio, nur tri estis sen rilato al la nuna milito aŭ militoj ĝenerale. Nenio surpriza en jaro, en kiu milito furiozas en lando proksima al la loĝlandoj de la plej multaj SAT-anoj. Sed ankaŭ indiko, kiel indas kritike rimarki, ke la geografia distribuo de la SAT-anaro influas la perceptadon, aŭ ne, de mondaj eventoj. Ke SAT almenaŭ deziras esti pli "tutmonda", konforme kun sia nomo, signalas la *Deklaracio* en la eldiro, ke oni "ankaŭ akre kondamnas ĉiujn aliajn militojn kaj agresajn okupaciojn, kiuj samtempe estas okazantaj en la mondo, kiel interalie en Sirio, Jemeno, DR Kongo, Palestino, Okcidenta Saharo".

## Venontjare en Greziljono

Manke de aliaj proponoj, la kongresanoj facile akceptis la proponon kongresi venontjare – unuafoje ĉeeste post Barcelono en 2019 – en Greziljono. Greziljono estas naturproksima, trankvila kampara situo por kongreso foje laborplena. Estas sence profiti de tiu pitoreska situejo en la posedo de esperantistoj kaj helpi pliigi ĝian uzatecon.

## Miksitaj sentoj pri interretbazitaj kongresoj

Laborkunvenoj funkcias bone en Zoom, kies uzo ne prezentas nesupereblajn defiojn al la partoprenantoj; kulturaj eroj ankaŭ surprize bone prezentiĝas. Interhoma rilatado tamen ne ekvivalentas al tiu de ĉeesta aranĝo. Ne eblas eviti la juĝon, ke ĝi malriĉas. Esence ĝi limiĝis al tutgrupa babilado dum interkunvenaj paŭzoj, malfavore al spontaneco, interindividuaj kontaktoj kaj amikiĝo, kiuj estas nepraj elementoj de kongresoj de la tradicia tipo.

Aliflanke, la kostoj de vojaĝado kaj kongrespartopreno estas ne sensignifaj ŝarĝoj por multaj. Por kelkaj la perinterreta kongreso estas la sola praktike alirebla kongreso. Krome, ekologiaj konsideroj eble estonte influos la decidon pri la kongresmaniero. Asocio kun "tutmonda" en sia nomo ne povas esti, aŭ resti, tiel eŭropcentra kiel SAT kaj entute la Esperanto-medio ĝis nun. Ĉe kongreso kun plurkontinenta partopenantaro, granda nombro da kongresanoj devas vojaĝi aviadile. Evidente malagrable por homoj, kiuj atentas pri sia persona ekologia premsigno kaj scias, kiugrade aviadiluzado katastrofigas ĝin. Teknika rafiniĝo de retplatformoj por kunvenoj kaj societumado atendeble faros ilin pli uzanto-afablaj, kaj iom post iom plilertiĝos uzantoj. Ĉu tio iam plene kompensos la nun sentatajn malsufiĉojn de reta kongresado, oni vidos. La estonteco montros, kia proporcia rilato inter ĉeestaj kaj virtualaj kongreso konvenos al la SAT-anoj.